

ESPERANTO - KOMITATO - INTERGRUPA  
de Bruselo.

-----  
S T A T U T O.  
-----

**I NOMO:**

La 14-an de januaro 1945 estas fondita en Bruselo "Esperanto-Komitato-Intergrupa" ( E.K.I.)

**II KONSISTO:**

EKI-Bruselo konsistas el la lokaj grupoj (kiuj hombras minimume 5 membrojn) de Bruselo kaj ĉirkaŭaj komunumoj kiuj al ĝi aliĝis kaj sin devigas per tiu aliĝo respekti la EKI-statuton.

EKI-Bruselo ne havas individuajn membrojn.

**III CELO:**

EKI-Bruselo celas:

- a) per ĉiuj rimedoj interkontaktigi kaj kunlaborigi la aliĝintaj grupoj organizante tiucele komunajn kunvenojn, aranĝojn kaj festojn;
- b) reprezenti la aliĝintajn grupoj kaj sekve la Bruselan esperantistaron ĉe la oficialaj instancoj urbaj, komunumaj kaj eventuale provincaj;
- c) akceli per ĉiuj rimedoj sed en la limoj de propra agad-kampo la instruadon kaj aplikadon de Esperanto.

**IV ALIĜOJ:**

Rajtas aliĝi al EKI-Bruselo ĉiuj grupoj SENESCEPTE, ekzistantaj en Bruselo kaj ĉirkaŭaj komunumoj.

**V DEVOJ:**

- a) La aliĝintaj grupoj ne faras politikan, religian propagandon en aŭ per EKI-Bruselo.
- b) EKI-Bruselo nur celas la ĝeneralan antaŭeniron de Esperanto; kaj sin tenas tute neŭtrala je naciaj, internaciaj aŭ fakaj Esperantomovadoj; neniel sin entrudante en la internan vivon aŭ propran agado de la aliĝintaj grupoj.

**VI FINANCOJ:**

Ĉiu aliĝanta grupo pagas unu fojo por ĉiam enirkotizon de 50 Fr. Sian financan rimedon EKI-Bruselo provos akiri per oficiala subvencio, per libervolaj donacoj kaj eventualaj profitoj el kursoj, festoj, paroladoj kaj ceteraj aranĝoj.

VII. DIREKTANTA KOMITATO-ESTRARO.

Ciu aliĝinta grupo delegas du konstantajn reprezentantojn kiu kune formas la direktantan komitaton.

En sia sino la direktanta komitato elektas la estraron kiu ekzistas minimume el tri personoj (Prezidanto- sekretario- kasisto) kiuj plenumas siajn oficojn almenaŭ dum unu jaro.

VIII. VOĈDONOJ.

Ciu aliĝinta grupo disponas pri UNU voĉo

Ciu voĉdono efektiviĝas per simpla plimulto.

Dum ĝenerala kaj jarkunveno ĉiuj ĉeestantoj de la aliĝintaj grupoj rajtas voĉdoni.

IX. FAKAJ KOMISIONOJ.

Por glate funkciigi la EKI-aparaton kaj speciale por ~~prie~~ studi propagandoblecojn kaj sukcesojn en specialaj medioj aŭ ĉe difinitaj instancoj la direktanta komitato povas starigi faka(j)n komisiono(j)n.

La fakaj komisionoj laboras sub la gvido de la direktanta komitato.

X. LINGVO.

La lingvo de EKI-Bruselo estas Esperanto.

Nur por celoj propagandaj EKI-Bruselo uzas lingvo(j)n ~~ne-~~ nacia(j)n?

Same en la rilatoj kun ne-esperantistoj.

XI. MODIFOJ AL LA STATUTO.

Sekve al propono de unu aliĝinta grupo la statuto povas esti modifata. Modifpropono devas esti skribe prezentita kun klarigoj.

XII. LIKVIDO.

EKI-Bruselo nur povas likvidiĝi se ĝi ekhavas malpli ol DU membroj.

En kazo de likvido la restanta membro decidas pri la Havaĵo.

La Prezidanto,

La Kasisto(ino),

La Sekretario,

La Vic-Prezidanto,

La Help Kasisto,

La Vic-Sekretario,